

**Esperanto
Societo
Frankfurto**

**septembro
oktobro
2014**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO - INFORMILO

Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzende
Katarina Eckstädt
Geschw.-Scholl-Str. 1
63486 Bruchköbel
Tel. 06181 76343

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt
**IBAN: DE75 5008
0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX**

Commerzbank
Frankfurt/Main

Beitrag:

Mit DEB-Beitrag 80 €
Familienmitglied 40 €


Nur ESF 20 €
Familienmitglied 10 €

vizito de kubo



foto:ke

Ariadna García Gutiérrez



franz von stassen 1905

Fine de julio ni havis plaĉan gastingon en „Albatros“. Ŝi estas el Kubo, aktiva en la Kuba Esperantista Junularo, de kiu ŝi estas elektita kiel membro de la komitato de TEJO. La vespero estis interesa kaj bela. Legu pli sur la paĝo 5.

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 18.9.2014

ĵaŭdon, la 18an de sept. 14

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein,
der am Donnerstag, den **18. 9. 2014** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj
interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu
okazos ĵaŭdon, la **18an de septembro
2014.**

18.30 h

SPRACHRUNDE

LINGVA RONDO

Die Fachausdrücke der Luftfahrt

La fakvortoj de la aerveturado

Welche Fluggeräte existieren, wie unterscheiden sie sich, wie sie genau heißen?

Kiuj flugaparatoj ekzistas, kiel ili distingiĝas, kiel ili precize nomiĝas?

Ulli Fellmann

19.30 h

**Norvegio de la Hurtigruten
-linio**



Mi rekomendas al ĉiuj,
fari tiun vojaĝon minimume unufoje dum la vivo.

W. Ullmann

Ĉi tiu frazo jam montras, ke ĉi tiu vojaĝo estis eksterordinara ankaŭ por la familio Ullmann, kiuj vizitis jam multajn partojn de la tero. Ni povas ĝoji pri interesa vespero.

Margarete und Walter Ullmann

donnerstag, d.2.10.2014

ĵaŭdon, la 2an de okt. 2014

18.30 h

SPRACHRUNDE

LINGVA RONDO

Ein Beitrag zur Energie-Diskussion

Natürlich mit vielen bekannten und unbekanntenen Wörtern:

Kontribuo al la energio-diskutado

Kompreneble kun multaj konataj kaj nekonataj vortoj:

Walter Ullmann

19.30 h

La tutmonda kaj la germana energiturniĝo

- kial ĝi tiom malfacilas? Kaj kiuj konceptoj kaj alternativoj estas?



- Vian blovon por energiturniĝo!
- Eure Puste für die Energiewende!

(el interreto) © Foto: BDZV

Die weltweite und die deutsche Energiewende

- was ist daran so schwierig? Welche Konzepte und Alternativen gibt es?

Ulli Fellmann

donnerstag, den 16.10.2014

ĵaŭdon, la 16an de okt. 2014

18.30 h

babbelstunden

babilaj horoj

geburtstage im september

naskiĝtagoj en septembro

Wilhelm Barnickel, 02.09.

Dennis Wibrow, 24.09.

Stoessel, Gisela 16.10.

Woter, Michael 29.10.

Ni gratulas!

geburtstage im oktober

naskiĝtagoj en oktobro

unser sommer

nia somero

Unser Sommer war wie jeder Sommer: sonnig und regnerisch, manchmal windig, mit interessantem Programm in dem Klub und schön durch die Begegnungen im Klub und „Albatros“.

Dennis Keefe und Lingva Festivalo

Das Treffen im Klub Anfang Juli war aus zwei Gründen interessant: Dennis Keefe hat uns besucht und der Vortrag von Ulrich Fellmann war auch für solche Mitglieder sehr interessant, zu denen ich auch gehöre, die zwar Auto fahren können, aber fast nichts darüber wissen.

Nachdem uns D. Keefe geschrieben hat, dass er uns besuchen wird, haben wir unsere Zeit für Lingva Rondo genutzt, um mit ihm zu sprechen.

Hr. Keefe hat Esperanto während seines Aufenthaltes in Madrid gelernt, wo er für die bekannte amerikanische Firma IBM gearbeitet hatte.

Inzwischen ist er in der Esperanto-Bewegung als Initiator des Sprachenfestivals bekannt. Es gibt zwei Arten des Festivals: das messemäßige und unterrichtsmäßige. Bei dem messemäßigen Festival bekommt man bei den betreffenden Ständen Informationen über die verschiedene Sprachen. Bei dem unterrichtsmäßigen werden Einführungsunterrichtsstunden gehalten. Dort können die Besucher hören, wie die betreffende Sprache klingt, wie sie geschrieben wird und bekommen den ersten Eindruck über die Grammatik.

Das erste Festival hat er 1995 im französischen Tours organisiert. Die Idee wurde aufgegriffen und wird seit 1996 in verschiedenen Ländern realisiert. Bei dem ersten Festi-

Nia somero estis kiel ĉiu somero: sunoplena kaj pluvema, foje venta, kun interesa programo en la klubo kaj bela pro la renkontiĝoj en la klubo kaj „Albatros“.

Dennis Keefe und Lingva Festivalo

La renkontiĝo en la klubo komence de julio estis interesa pro du kausoj: Dennis Keefe vizitis nin kaj la prelego de Ulrich Fellmann estis tre interesa ankaŭ por la membroj, al kiuj ankaŭ mi apartenas, kiuj ja scipovas konduki automobilon, sed nenion scias pri ĝi.

Post kiam D. Keefe skribis, ke li vizitos nin, ni uzis la tempon rezervitan por Lingva Rondo por paroli kun li.

S-ro Keefe lernis Esperanton dum sia restado en Madrido, kie li laboris por la konata usona firma IBM.



Dennis Keefe

Intertempe li estas en Esperantujo konata kiel iniciinto de la Lingva Festivalo. Ekzistas du specoj de la festivalo: foira formo kaj instruiga formo. Ĉe la foira formo vizitantoj ricevas informojn ĉe la standoj de diversaj lingvoj. Ĉe la lingvoinstrua formo okazas instruhoroj dum kiuj vizitantoj povas aŭdi kiel sonas certa lingvo, kiel ĝi estos skribita kaj ricevas la unuan impreson pri ĝia gramatiko.

val wurden an 789 Besucher 32 Sprachen in 96 kleinen Kursen präsentiert. Das größte Festival ist 2008 von der Universität in der chinesischen Stadt Nanjing organisiert wurden. Dort wurden 72 Sprachen und Dialekte in 250 kleinen Kursen an 13.547 Besucher präsentiert.

„La Ondo de Esperanto“ hat ihn zum Esperantisten des Jahres 2011 gewählt.

Das Leben von Herr Keefe ist interessant. Ein Mensch, der die erste Fremdsprache erst mit 25 Jahren gelernt hat und jetzt fünf Sprachen spricht. Wer mehr wissen will, kann im Internet die Seite von „La Ondo de Esperanto“ dann zu „Retpaĝo de Ondo de Esperanto“ (Sie werden das unter „ligiloj“ finden) und schließlich „Esperantistoj de jaro“ wählen. Da können Sie ein Interview mit ihm finden. Viel Spaß!

Ulli Fellmann und die Geschichte vom Auto

Unser Abend im Klub war weiter interessant.

Unser Mitglied Ulli Fellmann hat uns sehr interessant und auch für Nichtswisser wie mich leicht verständlich auf eine Reise durch die Jahrhunderte mitgenommen, in denen die Menschen versucht haben, Fahrzeuge zu konstruieren, ihre Erfindungen in Vergessenheit geraten sind und andere diese Ideen aufgegriffen haben. Das war ein großartiger Abend. Alle die nicht da waren, haben etwas verpasst!

Ariadna García Gutiérrez

Wir kennen Ihre Mutter, Maritza Gutiérrez; aus Kuba und jetzt hatten wir das Vergnügen, auch sie kennenzulernen. Eine intelligente, interessierte, offene junge Frau, die seit der Geburt Esperanto spricht und mit-arbeitet in der Weltorganisation der jungen Esperantisten (TEJO). Sie kam aus Wien, wo sie an einem Terminologieseminar teilnahm.

Leider konnte sie nicht bei einem Treffen im Saalbau teilnehmen, aber wir haben unser Treffen in „Albatros“ genutzt, um über die Arbeit der kubanischen Esperantisten aus erster Hand zu hören.

ke

Li organizis 1995 la unuan festivalon en Tours en Francio. La ideo estas kontinuigita kaj ekde 1996 estas en diversaj landoj realigita. Ĉe la unua Festivalo estas al 789 vizitantoj prezentitaj 32 lingvoj en 96 kursetoj. La plej granda Festivalo okazis en Nanjing en Ĉinio organizita de la universitato. Tie estis prezentataj en 250 kursetoj 72 lingvoj kaj dialektoj al 13.547 vizitantoj.

„La Ondo de Esperanto“ elektis lin kiel esperantisto de la jaro 2011.

Ekzistas multo kio estas interesa en la vivo de D. Keefe, homo kiu la unuan fremdan lingvon lernis, kiam li estis jam 25-jara kaj nun parolas kvin lingvojn. Kiu deziras pli scii pri li, vizitu en la interreto „La Ondo de Esperanto“, prenu ĉe ligiloj la retpaĝon de Ondo de Esperanto kaj tie elektu Esperantistoj de la jaro. Tie estas ankaŭ longa intervjuo kun li. Multan plezuron!

Ulli Fellmann kaj historio de aŭto

Nia vespero en la klubo estis plu interesa.

Nia membro Ulli Fellmann kunprenis nin al interesa kaj ankaŭ por nenionsciantoj kiel mi komprenebla vojaĝo tra jarcentoj. Jarcentoj dum kiuj homoj provis konstrui veturilojn, tiuj eltrovaĵoj estis forgesitaj kaj aliaj homoj denove komencis realigi similajn ideojn. Tio estis eksterordinara vespero. Ĉiuj kiuj ne partoprenis ĝin, preterlasis multon.

Ariadna García Gutiérrez

Ni konas ŝian patrinon, Maritza Gutiérrez; el Kubo kaj nun ni havis la plezuron, konatiĝi ankaŭ kun ŝi. Ŝi estas inteligenta, interesiĝanta, sensiva juna virino denaska esperantistino, komitatanino de TEJO. Ŝi venis el Vieno, kie ŝi partoprenis seminarion pri terminologio.



Bedaŭrinde ŝi ne povis partopreni nian kunvenon en la klubo. Tial ni uzis nian renkontiĝon en „Albatros“ por ekscii multon pri la laboro de la kubaj esperantistoj.

ke



Sie war ein Frankfurter und sie war ein Amsterdamer Mädchen. In Frankfurt hat sie nur vier Jahre und in Amsterdam elf Jahre gelebt. Sie wäre am 12.6. dieses Jahres 85 geworden.

„Die Familie der Anne Frank kehrt nach Frankfurt zurück“, war Ende Februar der Titel eines großen Artikel, in der „Frankfurter Rundschau“, einer Zeitung aus Frankfurt, der Geburtsstadt der Anne Frank und Wohnort ihrer ganzen Familie.

Buddy Elias, der einzige noch lebende Verwandte von Anne Frank, ihr Cousin, gab dem Jüdischen Museum in Frankfurt als Dauerleihgabe Kollektionen der drei verwandten Familien: Frank, Elias und Stern. Es handelt sich um mehrere hundert Gegenstände (Dokumente, Fotos, Briefe, Möbel, Tafelsilber und Souvenirs), die bis 2015 nach und nach aus Basel nach Frankfurt gebracht werden.

Die Familie Frank lebte in Frankfurt. Man kann sie bis ins 17. Jahrhundert zurückverfolgen. Damit kann man auch das Leben im ersten jüdischen Getto (seit 1462) in Deutschland verfolgen. Unter den Gegenständen ist auch das Bild der Ururgroßeltern von Buddy Elias und Anne Frank, Elkan Juda Cahn und seiner Frau Betty.

Das Bild zeigt ein bürgerliches Paar, gekleidet in Sonntagskleider aus den 60er Jahren des 19. Jahrhunderts. Der Ururgroßvater Elkan Juda Cahn ist 1796 im Frankfurter Getto geboren. Er war Hausierer. Das Bild vermittelt den Eindruck, dass das ein Paar ist, das sich nicht viel für das Judentum interessiert. Es existiert ein Brief des Ururgroßvaters, in dem er schreibt, dass die Zeit, in der er ein Hausierer war, eine schöne Zeit war, weil er

Ŝi estis frankfurta knabino kaj ŝi estis ankaŭ amsterdama knabino. En Frankfurto ŝi vivis nur kvar jarojn, en Amsterdamo dek-unu. Ŝi estus la 12an de junio ĉi jare 85jara. „La familio de Anne Frank revenas hejmen“ estis fine de februaro la titolo de granda artikolo de Frankfurter Rundschau (Frankfurter Rundschau), ĵurnalo el Frankfurto/M., naskiĝurbo de Anne Frank kaj loĝurbo de ŝia tuta familio.

Buddy Elias, sola vivanta parenco de Anne Frank, ŝia kuzo, daŭre pruntedonis al la Juda muzeo en Frankfurto la kolektojn de tri parencaj familioj Frank, Elias kaj Stern. Temas pri pluraj centoj da aĵoj (dokumentoj, bildoj, fotoj, leteroj, mebloj, arĝentaĵoj kaj memoraĵoj) kiuj paŝo post paŝo estos kunportitaj el Bazelo kaj al Frankfurto ĝis 2015.

La familio Frank vivis en Frankfurto. Oni povas sekvi ĝin ĝis la 17a jc. Kaj tiel sekvi ankaŭ la vivon en la unua juda geto (ekde 1462) en Germanio. Inter pruntedonitaj aĵoj de Buddy Elias estas ankaŭ la bildo de prapraavoj de Buddy Elias kaj Anne Frank, Elkan Juda Cahn kaj lia edzino Betty.



La bildo montras burĝan paron vestita per pordimanĉaj vestaĵoj el la 60aj jaroj de 19a jarcento. La prapraavo Elkan Juda Cahn

aus dem Getto und seinen engen Gassen raus gehen konnte. Das ist ein verständliches Gefühl, wenn man weißt, dass Frankfurter Getto eine enge Straße war, die an der Außenseite der Stadtmauer gebaut wurde. Die Lebensbedingungen waren nicht gut, weil immer mehr Menschen dort lebten und die Häuser immer weiter aufgestockt wurden. Die Enkelin von Elkan und Betty, Alice, heiratete den Bankier Michael Frank. Sie wohnten in der heutigen Dantestraße nahe der Senckenberg Anlage und hatten drei Söhne und eine Tochter. Otto Frank, der Vater der Anne Frank war das zweite Kind, Helena (Lena), die Mutter von Buddy Elias, das vierte.

Buddy Elias wurde 1925 in Frankfurt geboren, also vier Jahre vor seiner Cousine Anne Frank. Die Familie Elias zog 1931 wegen der Arbeit des Vaters aus Frankfurt nach Basel (Schweiz) um. Das rettete ihr Leben.

Andere Familienmitglieder haben früh die Bedrohung durch die Nationalsozialisten erkannt. Robert, der ältere Bruder von Otto Frank, emigrierte nach Großbritannien, der jüngere, Herbert, ging nach Paris, die Mutter Alice, inzwischen Witwe, zog zu ihrer Tochter Lena nach Basel.

Mit Hilfe des Schwagers Erich Elias ging Otto Frank 1933 nach Amsterdam, wo er eine Filiale der Firma Opekta gründete. Seine Frau Edith ging mit den Töchtern Margot und Anne zu ihrer Mutter nach Aachen. Von dort gingen sie zusammen mit der Großmutter Rosa Holländer 1934 nach Amsterdam.

Sie waren sowohl in Frankfurt als auch in Amsterdam assimilierte Juden, bis am 10. Mai 1940 deutsche Soldaten in die Niederlande einmarschierten.

Auch die Familie Elias in Basel merkte und spürte die Veränderungen im Deutschland. 1936 ordnete die Pomosin-Firmenzentrale in Köln an, dass man prüfen sollte, ob die Mitglieder des Vorstandes und des Aufsichtsrates ihrer Tochterfirma Rovag in Basel rein arisch sind. Erich Elias war Jude und verlor seinen Posten. Er musste für viel weniger Geld in dem Labor der Firma arbeiten. In der Zwischenzeit war auch seine Mutter Ida bei ihnen in Basel.

estis naskita en la jaro 1796 en la geto de Frankfurto. Li estis migranta etvendisto. La bildo donas la impreson, ke ĉi tie estas paro kiu ne multe interesiĝas pri judeco. Ekzistas letero de la prapraavo en kiu li skribas, ke la tempo, kiam li estis migranta etvendisto estis bela tempo, ĉar li povis eliri el la geto kaj ĝiaj tre mallarĝaj stratoj. Komprenebla sento se oni scias ke la frankfurta geto estis mallarĝa strato alkonstruita al la ekstera parto de la urba muro. La vivkondiĉoj ne estis bonaj ĉar ĉiam pli da homoj vivis tie kaj la domoj estis alkonstruitaj.

La nepino de Elkan kaj Betty, Alice, edziĝis al bankiero Michael Frank. Ili loĝis en la hodiaŭa Dantestraße proksime de Senckenberg Anlage kaj havas tri filojn kaj unu filino. Otto Frank, la patro de Anne, estis la dua, Helena (Lena), la patrino de Buddy Elias, estis la kvara el la infanoj.

Buddy Elias naskiĝis en Frankfurto 1925, do kvar jarojn antaŭ Anne Frank, lia kuzino. La familio Elias transloĝiĝis el Frankfurto al Bazelo (Svisio) en la jaro 1931 pro la laboro de lia patro. Tio savis iliajn vivojn.

Aliaj membroj ekkonis frue la minacon pro la naziistoj. Robert, la pli aĝa frato de Otto Frank, elmigris al Britanio, la pli juna, Herbert, al Parizo, la patrino Alice, intertempe vidvino, al sia filino Lena en Bazelo.

Otto Frank per helpo de sia bofrato, Erich Elias, foriris en la jaro 1933 al Amsterdamo, kie li organizis la filion de la firmo Opekta. Lia edzino Edith kaj la filinoj Margot kaj Anne foriris al sia patrino en Aĥeno. De tie ili kune kun la avino Rosa Holländer foriris 1934 al Amsterdamo.

Ili estis asimilitaj judoj en Frankfurto kaj ili estis asimilitaj ankaŭ en Amsterdamo. Ĝis la 10a de majo 1940 kiam germanaj soldatoj enmarŝis en Nederlando.

Ankaŭ la familio Elias en Bazelo rimarkis kaj sentis la ŝanĝojn en Germanio. En la jaro 1936 ordigis la centra oficejo de firmo en Kolonjo esploradon, ĉu ĉiuj membroj de la direktorio kaj kontrolkonsilio de la filino-firmo Rovag en Bazelo estas arja. Erich Elias estis judo kaj perdis sian postenon. Li devis labori en la laboratorio de la firmo por multe malpli da mono. Intertempe estis ankaŭ lia patrino, Ida, ĉe ili en Bazelo.

Die Familien hatten Kontakt und besuchten sich gegenseitig. Anne Frank war 1938 zum letzten Mal in Basel.

Otto Frank suchte eine Möglichkeit, um die Niederlande zu verlassen, fand sie aber nicht. Darum suchte er auch eine Möglichkeit, sich und seine Familie zu verstecken. Er bereitete das Versteck lange vor, bevor sie es benutzen mussten. Sie kamen in ihr Versteck, nachdem Margot Frank am 6. Juli 1942 aufgefordert wurde, sich „für den eventuellen Arbeitseinsatz im Ausland“ zu melden.

Am folgenden Tag versteckten sie sich im Hinterhaus der Firma. Die Tür wurde hinter einem Aktenregal versteckt. Sie waren nicht allein. Zu ihnen kam die Familie van Pels (Vater, Mutter und Sohn) und der Zahnarzt Fritz Pfeffer. Viele Menschen in wenigen Räumen und alle mussten während der Arbeitszeit in der Firma sehr still sein.

Sie waren bis zum 4. 8. 1944 in dem Versteck, als sie verraten, abgeholt und in das Durchgangslager Westerbork gebracht wurden. Außer ihnen wurden auch zwei Helfer, die Angestellte der Firma waren, abgeholt. Die Helferin Miep Gies wurde nicht verhaftet. Mit dem letzten Transport aus Westerbork wurden sie nach Auschwitz gebracht. Die Töchter wurden dann noch zum Konzentrationslager Bergen-Belsen transportiert, wo sie beide Ende Februar/Anfang März an Typhus starben. Edith Frank starb im Januar 1945 an Unterernährung. Nur Otto Frank überlebte. Er kam über Odessa und Marseille in die Niederlande und lebte später in Basel, wo er am 19.8.1980 starb. Nach der Verhaftung kam die Helferin Miep in das Versteck, um zu sehen, was sie retten könnte. In den Räumen herrschte Chaos, die Bücher und Papiere lagen auf dem Boden. Dort fand sie das Tagebuch.

Anne war nicht die erste, die ein Tagebuch schrieb. Fast alle aus der Familie (auch aus der vorherigen Generationen) schrieben Geschichten und Tagebücher. Sie alle waren gute Beobachter der Menschen in ihrer Umgebung und der Gesellschaft. Das kann man auch bei Annes Tagebuch merken.

Anne bekam das Heft für das Tagebuch zu ihrem 13. Geburtstag. Sie schrieb die

La familioj havis kontakton kaj vizitadis unu la alian. Anne Frank estis lastan fojon 1938 en Bazelo.

Otto Frank serĉis eblecon por foriri el Nederlando sed li ne trovis ĝin. Tial li serĉis ankaŭ eblecon por kaŝi sin kaj sia familio. Li preparis la kaŝejon longe antaŭ ol ili devis uzi ĝin. Ili venis en la kaŝejon post kiam la 6an de julio 1942 Margot Frank ricevis ordonon sin registri „por la eventuala labordevo en eksterlando“.

Sekvantan tagon ili kaŝiĝis en la korta parto de la domo de firma. La pordo estis kaŝita malantaŭ la aktujbretaro. Ili ne estis solaj. Al ili venis familio van Pels, patro, patrino kaj filo kaj la dentisto Fritz Pfeffer. Multaj homoj en malmultaj ejoj kaj ĉiuj devis esti tre trankvilaj dum la labortempo en la firma.

Ili estis en la kaŝejo ĝis la 4an de aŭgusto 1944 kiam ili post la perfido estas arestitaj kaj portitaj al la transitkoncentrejo Westerbork. Krom ili estis arestitaj ankaŭ du ofiĉistoj de firma, kiuj estis helpantoj. La helpantino Miep Gies ne estis arestita. Per la lasta transporto el Westerbork ili estas transportitaj al Auschwitz. La filinoj estis ankoraŭ foje transportitaj reen ĝis la koncentrejo Bergen-Belsen kie ili ambaŭ pro tifo mortis fine de februaro, komence de marto. Edith Frank mortis la 6an de januaro 1945 pro la subnutrado. Nur Otto Frank transvivis. Li revenis al Nederlandon tra Odeso kaj Marsejlo. Li post e vivis en Bazelo kaj mortis la 19an de aŭgusto 1980.

Post ilia arestado venis helpantino Miep en la kaŝejon por rigardi, kion ŝi povas savi. Estis kaoso en la ejoj, libroj kaj paperoj kuŝis sur la planko. Tie ŝi trovis la tagolibron.

Anne ne estis la unua kiu skribis tagolibron. Preskaŭ ĉiuj el la familio (ankaŭ el antaŭaj generacioj) skribis rakontojn kaj tagolibrojn. Ili ĉiuj estis bonaj spektantoj de homoj ĉirkaŭ si kaj de la socio. Tion oni povas rimarki ankaŭ ĉe Anne en ŝia tagolibro.

Anne ricevis la kajeron por la tagolibro por sia 13a naskiĝtago. Ŝi skribis leterojn al „sia amikino Kitty“. Ĝi estas unu el plej multe tradukitaj libroj. Lau ĝi ekestis teatra dramo kaj filmo.

Buddy Elias iĝis aktoro. Anne skribis en sia tagolibro, ke ili aŭdis, ke Buddy ricevis rolon en teatro. Li ludis en pli ol 70 filmoj kaj mul-

Briefe an „ihre Freundin Kitty“. Es ist eins der am meisten übersetzten Bücher. Nach dem Buch entstanden ein Drama und ein Film.

Buddy Elias wurde Schauspieler. Anne schrieb in ihrem Tagebuch, dass sie gehört haben, Buddy hätte eine Rolle im Theater bekommen. Er spielte in mehr als 70 Filmen und in vielen Fernsehfilmen und -serien. Auch seine Frau und seine zwei Söhne sind Schauspieler. Er ist der Präsident der Anne Frank-Stiftung, die der Vater von Anne Frank 1963 gründete. Die Stiftung arbeitet gemeinnützig und besitzt die Rechte an dem Tagebuch. Otto Frank hinterließ das Tagebuch dem niederländischen Staat und so wird es da bleiben. Es ist in dem Anne Frank-Haus in Amsterdam ausgestellt. So ist in Amsterdam das Zentrum des Interesses an der Geschichte der Verfolgung Anne Franks und in Frankfurt die Geschichte der Familie Frank.

Der Weg des Hausierers Elkan Juda Cahn bis zum etablierten Händler war sicher sehr lang. Ja, diese Zeit war auch schön, aber sie haben sie auch gerne hinter sich gelassen. Vor allem wünschten sie sich, dass ihre Kinder bessere Lebensumstände als sie selbst haben. Nicht nur die Familie Frank. Sie sind nur ein Beispiel für die Juden, die in Frankfurt lebten. So werden die Gegenstände der Familie Frank das Leben der Juden in Frankfurt zeigen. Sie alle nutzten die Möglichkeiten zur Bildung. Lesen und Schreiben hatte eine wichtige Rolle. Gerade diese Wichtigkeit der Bildung ermöglichte der Familie Frank, Elias und Stern einen Ausweg aus dem Getto.

Jetzt bekommt das Jüdische Museum die Gegenstände der drei verwandten Familien aus dem Besitz der Anne Frank Stiftung, die das Leben der Juden in Frankfurter Getto in fast ein hundert Jahren darstellen. Sie werden also nicht nur zum Spiegel der Familie Frank sondern auch das Fenster zum jüdischen Getto in Frankfurt. „Mit dem heutigen Tag schließen wir einen Kreis, wir verbinden die Wurzeln der Familie mit der Zukunft.“ sagte Buddy Elias.

Gefragt, welcher Satz aus dem Tagebuch ihm am meisten gefällt, antwortete Buddy

taj televidaj serioj kaj filmoj. Ankaŭ lia edzino kaj liaj du filoj estas aktoroj. Li estas prezidanto de Anne Frank Fonds (Anne Frank Fondo), kiun fondis la patro de Anne Frank en la jaro 1963. La Fondo estas senprofita kaj ĝi posedas la rajton por la tagolibro. Otto Frank testamente postlasis la tagolibron al la nederlanda ŝtato kaj ĝi restos tie. Ĝi estas ekspoziciata en la Domo de Anne Frank en Amsterdamo. Tial estas en Amsterdamo en la centro de intereso la historio de la persekutado de Anne Frank kaj en Frankfurt la familia historio.

Certe estis tre longa kaj malfacila vojo de etvendisto Elkan Juda Cahn ĝis establita burĝa komercisto. Jes, tiu tempo estis ankaŭ bela sed ili tamen volonte lasis ĝin malantaŭ si. Antaŭ ĉio ili deziris, ke iliaj infanoj havu pli bonajn vivokondiĉojn ol ili. Ne nur la familio Frank. Ili estas nur ekzemplo por judoj vivintaj en geto. Tiel montros aĵoj de la familio Frank ankaŭ la vivon de judoj el Frankfurt. Ili ĉiuj uzis edukeblecojn. Legi kaj skribi havis gravan rolon. Ĝuste tiu graveco de edukado ebligis al la familioj Frank, Elias kaj Stern eliron el la geto.

Nun ricevas la Juda Muzeo aĵojn de la tri parencaj familioj kaj tion kio posedas la Anne Frank Fondo, kiuj montras la vivon de judoj en frankfurta juda geto dum preskaŭ unu jarcento. Do, ili estos ne nur spegulo de la familio Frank, sed ankaŭ la fenestro al la juda kvartalo de Frankfurt. „Per ĉi tiu tago ni fermas la cirkon, ni ligas la radikojn de la familio kun estonteco“, diris Buddy Elias.

Demandita kiu frazo el la Tagolibro plej multe plaĉas al li, Buddy Elias respondis: „Foje ni estos homoj, ne nur judoj“

ke

Uzataj tekstoj:

- Anne Franks Erbe kehrt nach Frankfurt zurück (dpa/lhe)
- Mirjam Pressler: „Grüße und Küsse an alle“. Die Geschichte der Familie von Anne Frank (Buchtipps)
- Geschichte der Familie Frank
- Welt online Holocaust / Sven Felix Kellerhoff (02.03.2012) Anne-Frank-Zeugnisse kehren nach Frankfurt zurück
- Spiegel online einestages Familie der Anne Frank Erinnerungen vom Dachboden Interview mit Buddy Elias geführt von Katja Iken
- Jüdisches Museum/Dokumente von Anne Frank kommen nach Frankfurt
- Nationalsozialismus Sendung Vom 22.03.2014 Das Tagebuch der Anne Frank
- Die Welt 7.3.12 "Warum wurde Anne Frank zu einer Ikone?"

Elias: „Einmal werden wir wieder Menschen sein und nicht nur Juden.“

- Frankfurter Rundschau 29.2.12. Claudia Michels: Zurück in der geliebten Stadt
- 12.6.14 Beate Rohkohl-Hildenbrand: Spurensuche in Wehmut

albumo

Malgranda petolulino - Anne estis ĉarma petolulino, tre ludema, same kiel mi, diras Bernhard Buddy Elias en einestages-Interview.



Tagolibro de Anne Frank



Post sia geedziĝfesto loĝis la geavoj de Anne, Alice kaj Frank en ĉi tiu domo en la hodiaŭa Dante-strato. Inter la aĝoj kiujn estos en la Juda Muzeo troviĝas ankaŭ iliaj aĝoj.





Patro Otto kun filinoj Margot kaj Anna



Edith Frank, la patrino



Otto Frank



La familio Frank 1892. Meze la avino Alice, maldekstre la avo Michael Frank.



Miep Gies

Alle Fotos sind aus dem Internet.
Ĉiuj fotoj estas el interreto.



Kvar ŝirmantoj kaj unu savitulo.
Otto Frank (meze) mit Miep Gies (maldekstre), Bep Voskuijl, Johannes Kleiman kaj Victor Kugler. La foto estas el 1945.



Du vivoj - Mi vivis dum tuta mia vivo
du vivojn, tiun de la aktoro kaj klaŭno
kaj tiun de la kuzo de Anne Frank,
diras Bernhard Buddy Elias.

el esperanto-literaturo



foto: ke

Papavo

Inter spikaro ora,
en bluzo ruĝkolora
vi staras kiel granda,
okulojn altiranta
papavo,
kaj pelas min sopiro
alkuri por akiro
de via sorĉa drogo
vokanta per allogo
por havo
de dolĉa ebrieto,
tratikla malkvieto,
ĝis la beata plonĝo
en la torpora sonĝo
de ravo...

Koloman Kalocsay
(1891-1976)